

esperanto USA

The ELNA

Newsletter: News of the Language Problem and Esperanto as the solution

1991(5)

Making News This Issue

The Board Speaks

At this year's ELNA Congress in Raleigh, NC, the Board of Directors made a number of important decisions. You'll find these listed in the next column to the right, and some editorial comments about them on the next page.

See Pages 1-2

Many Letters

ELNA's publications lauded ... Helping gifted and talented Hungarian children ... Comments on National Public Radio's report on Esperanto ... Ideas on making ELNA work better.

See Pages 7-8

On the Line

Reginald Jaderstrom reviews the latest Esperanto book published in the United States, *Sur la linio*, a collection of short stories by award-winning Spanish Esperantist author Georgo Kamaĉo.

See Page 9

In This Issue:

Newsnotes from the C.O. 5

Esperanto Documents 9

Yet More Language Gaffes and Problems... 11

And Much, Much More to
Delight and Inform You!

ELNA Marŝas

Lastatempaj Decidoj de la Estraro

La Estraro nomas s-ron William R. Harmon Komisiito pri la Centra Oficejo por la periodo 1a de junio 1991 ĝis 31a de majo 1992.

La kerno de la 1991 ELNA Kongreso estos dum semajnfino, sabate kaj dimanĉe, por ke kiel eble plej multaj de niaj membroj povu partopreni; iuj pejzaĝveturoj okazu antaŭ aŭ post tiu semajnfino; kaj iuj estrarkunsidoj, kiuj bezonus pli ol la havebla tempo, okazu aŭ estu pritraktitaj antaŭ la kongreso.

ELNA ŝanĝos sian fiskan jaron por ke ĝi komenciĝu la 1an de majo kaj finiĝu la 30an de aprilo.

Ekde la jaro 1992 la kotizoj por ELNA estos jenaj: Individua Membro, \$30; Familia Membro, \$45; Junula membro, \$15; Subtena Membro, \$60; Dumviva Membro, \$600; Membro kun Limigitaj Enspezoj, \$15; "Friend of Esperanto," \$10.

ELNA eldonos nur ses numerojn de *Esperanto USA* kaj unu numeron de la *Literatura Suplemento* dum la fiska jaro 1992.

Oni faros la jenajn ŝanĝojn en la fondusoj de ELNA:

- Oni renomu kaj rekalkulu la fondusojn dividante la fondusojn de Gibson kaj Massey;

- Oni ĉiujare kalkulu la proporcian interezon sur la kapitalfondintaj fondusoj (Gibson kaj Massey) kaj verŝu ĝin en la Ĝeneralan Kason, kune kun la interezo el la Dumviva Fonduso;

- Ĉiujare, oni kalkulu la proporcian interezon el fondusoj Wood kaj Lewis, kaj verŝu ĝin en la SFSU-Fonduson, tio laŭ la deziroj de donacintoj;

- Ĉiujare, oni distribuu la restan interezon, proporcie, en la aliajn fondusojn (Vidbenda, Televida, Thompson, Sonbenda, SFSU-a, Historia, Glenny, Eldonada);

- Oni faru grandskalan donac-kampanjon, kun stipulo ke ĉiu ano kiu donacas \$2,000 aŭ pli povus postuli

apartan fonduson kaj ankaŭ povus postuli la interezuzon (ekz. en la SFSU-an Fonduson, en la Ĝeneralan Kason, ktp).

La proponita buĝeto por fiska 1992 estas akceptita.

La Estraro: agnoskas, ke okazis eraroj neintence en la pasintjara balotado; daŭrigas la strebadon eviti tiajn erarojn en la estonteco; kaj akceptas la rezultojn de la balotado pasintjara.

ELNA starigos Komitaton por Edukado kaj kreos Edukan Fonduson por malkovri, kontakti kaj peti monon de diversaj korporacioj, fondusoj, kaj individuoj por disvastigi la Internacian Lingvon.

ELNA sendos ekzempleron de la Richardson-libro kaj de *ELNA Update* al la bibliotekoj de la 14 plej taŭgaj ĵurnaloj kaj la ok plej taŭgaj revuoj en Usono por ke ili havu freŝan informon pri Esperanto. La salajro de la Vic-Direktoro de la Centra Oficejo estos plialtigita je 10%.

Oni decidis pri la metodo uzota por proporcie plialtigi la saldojn en la diversaj kontoj.

ELNA kreos abonon al *Esperanto U.S.A.* por bibliotekoj aŭ institucioj je duono de la kutima individua membro-kotizo. Individuoj daŭre ne rajtos aboni ĝin sed devos estiĝi membroj por ĝin ricevi.

ELNA akceptas la rekomendon de Doroteo Holland-Kaupp de la Amerika Asocio de Instruistoj de Esperanto ke ĝi rezignu pri la tasklibroj pli frue aprobitaj de la Estraro kaj anstataŭe rekomendu la eventuale aperontan libron de David K. Jordan.

ELNA nuligas la pli fruan decidon pri la eldono de faldfolioj, komprenante, ke eventuale jam verkita artikolo de d-ro Giorgio Silfer aperu en *Esperanto U.S.A.* kaj/aŭ *ELNA Update* se la aŭtoro permesas.

ELNA akceptas la proponon de Ellie Stein, Komisiito pri Virinaj Aferoj, ke pro verŝajna manko de intereso tiu Komisiono estu nuligita.

E D I T O R I A L

DECISIONS, DECISIONS!

Somewhere in the *Statuto* of ELNA it is written that the League's official organ (that's *Esperanto U.S.A.*) shall report all decisions of the *Estraro* (the Board of Directors) to the membership. This is a rule that in past years has been more honored in the breach than in the observance. As you can see from the front page of this issue, we're now playing catch-up. The first two decisions listed here were passed in a mail vote late this spring; the others were adopted by the *Estraro* during more than nine hours of hard-working meetings at the ELNA Congress in Raleigh in late July. Herewith some editorial comments and, hopefully, a bit of explanation about those that will most directly affect you.

- Change of the fiscal year. This year for the first time, the President requested the Treasurer to make a preliminary budget available to the Board for study before the Congress. The Treasurer, through hard work and with the help of the Director of the Central Office, barely managed to do this, since the fiscal year did not end until just a month and a half before the Congress. By ending the fiscal year a month earlier, it will in future be possible to have a better and more accurate budget ready for study longer before the Congress starts. As far as the membership is concerned, the only effect of this will be that the 1992 fiscal "year" will be eleven months long instead of twelve months.

- Dues changes. We've been discussing finance in these pages for the last several months. ELNA finished fiscal 1991 with a small surplus and a somewhat larger increase in its capital fund; but it remains limited in new programs that it can undertake. Since there has not been a dues increase in a decade, it was finally decided to increase all dues by about 20%. Hopefully, this will give us some elbow room in which to undertake a few minor projects...

- Only six numbers of *Esperanto U.S.A.* in fiscal 1992. When I saw this, I actually started drafting my resignation as editor; but then I saw those magic

words *fiscal year*, and remembered that decrease in the length of fiscal 1992. I checked my publishing schedule and noticed that this decision should make *absolutely no difference* in the number of issues you receive in either calendar 1991 or 1992. Certainly the Board could have had no intention of cutting back on your newsletter at the same time that (a) they increased your dues, (b) they adopted a subscription price for libraries and other institutions, and (c) the Congress passed a resolution commending the editor for the recent improvements in the newsletter.

- Establishment of an Education Committee and Fund. ELNA has historically served as a repository for donations for scholarships at the San Francisco State courses; but today there are increasing numbers of worthy educational activities that need support, most immediately Charlotte Kohrs' *Infanoj ĉirkaŭ la mondo*, which addresses an entirely different clientele than SFSU. With this decision, the Board is taking cognizance of this trend.

- Increase of the Vice-Director's salary. About this I will only say that the Vice-Director and the Director are both well above the government's poverty line—but only because, since the nineteen-sixties, the government has been very stingy about increasing that poverty line to match inflation.

- New subscription price for *Esperanto U.S.A.* Starting in 1992, this will be \$15. Notice that it doesn't apply to individuals; but you might want to check with your local library to see if they'd like to receive this magazine. Same goes for university libraries and the like. If you do visit the librarian, please take along a copy, and be sure to point out the ISSN number on the back page; libraries like those numbers!

- Cancellation of workbook and folder series. See issue 1991(3) for the original decisions about these two series of publications. Mark Stephens originally came up with the idea of these two series, and it was a good one. Unfortu-

nately, right now no one has the time to work on them. I suspect that they will eventually be revived, and I hope that at that time we will all remember who originally proposed and developed these two concepts. The "eventuale aperonta libro de David K. Jordan" mentioned in this context is Prof. Jordan's excellent *Being Colloquial in Esperanto: A Reference Guide for Americans*, which is now in the process of seeking a publisher.

- Nullification of the position of Commissioner for Women's Affairs. Ellie Stein, who over the years has shown much interest in this particular field, evidently feels that there is not enough interest in this subject among Esperantists (but see next issue's letter column!).

ELNA Congresses always pass resolutions. This one passed three. One was for the Local Congress Committee, which according to preliminary reports (and I hope to have full information for the next issue) produced a totally triumphant Congress. (Sorry, I just went to see *Bill and Ted's Bogus Journey*.) The second, as mentioned above, consisted of thanks and congratulations to the editor for the improvements over the last few years in the newsletter.

The most important was the election of John Massey to honorary membership in ELNA. John's financial support to ELNA over the past decade has been second only to that of Ella Gibson; but more importantly, John has been responsible for financially revamping the organization, computerizing and updating its accounting systems, and generally working himself half to death to make ELNA's finances run properly. He is now entering his third (or is it fourth?) period as Treasurer, and remains the guiding light on the Investment Committee. By making him an Honorary Member, the Congress has given John a well-deserved "Thank you!"

Don Harlow

NEWSBRIEFS

Esperanto in the Media

World Literature Today, a magazine that occasionally mentions Esperanto literature, in one of its recent issues (Winter, 1991) carries a book review by ELNA member James F. Cool, of Wilmington College (OH) of ELNA member Julius Balbin's recent poetic work *Imperio de l' koroj*.

"Universal language is 'Esperanto'" says Mike Reardon in an article in the Taunton, MA, *Weekender* (Mar. 30, 1991). The front-page article is based on interviews with Taunton-area Esperantists Carlos de Jesus and Richard Guillemette. It tells how they both came to learn Esperanto, and describes something of the language's grammar and its current status. Two photos of the two men, one of them in color, are contained in the article. (sent by Richard Guillemette)

Along with the article in the Taunton, MA, *Weekender* mentioned above, staffer Mike Reardon has a second article describing how Carlos de Jesus met his wife Ercilia through Esperanto. (sent by Richard Guillemette)

In an article in the religious magazine *30 Days* (April, 1991), a gentleman named Cardini, in a discussion of contrasts between 13th century Christianity and 20th century secularism, makes the following interesting statement: "Ecumenical mixtures create esperanto, which is not a language and which is used by people who do not have the slightest idea of what a language is or what culture means." It is questionable how much faith may be placed in any other statements Mr. Cardini makes... (sent by James Davis)

An article "Become United By the Pure Language" in *The Watchtower* (May 1, 1991) mentions Esperanto as the universal language project that "has had the most impact because about 10,000,000 people have learned it since its creation in the year 1887." (from Patricia A. Morris and Thomas J. Palmer)

John A. Cutter of the St. Petersburg, FL, *Times* (May 5, 1991) dedicates an article to Palm Harbor resident Bill Deary, 95 years of age, who sings in a local barbershop quartet. Among Deary's other interests, the article explains, is Esperanto, in which language he still keeps a diary. The article describes Esperanto as "an old artificial language that once was touted as a universal language." (sent by Bill Deary and Armand B. Coigne)

Linda B. Hirsh, in an article in The Hartford, CT, *Courant* (June 10, 1991), describes the two one-week summer Esperanto courses scheduled to be held at the University of Hartford in August. The article goes into some detail about Esperanto's current status, pointing out that "It is the only international language project to have grown into a full-fledged language." Hirsh also mentions the 1985 UNESCO resolution "calling for more international organizations to use the language and more schools to teach the language." (sent by Humphrey Tonkin)

"One Language, One Understanding" is the title of an article in the Southern Illinois University *Observer* (June 11, 1991) which describes recent work by Prof. Ron Glossop to promote Esperanto among teachers of gifted and talented children. The article emphasizes Prof. Glossop's recent trip to Eastern Europe and the USSR, where he visited Fondájo Talento in Budaörs, Hungary, and his forthcoming participation in the Ninth Bi-Annual World Conference for Gifted and Talented Children in The Netherlands. (sent by Ron Glossop)

Esperanto is in *Jeopardy*—again! On June 27, 1991, one of the contestants on the well-known television game show, faced with the statement that "According to the *World Almanac and Book of Facts*, this international language has two million speakers," correctly asked: "What is Esperanto?" (reported by Ionel Onet)

Those visiting San José, CA, may wish to take lunch at the main dining area of the Gordon Biersch Brewing Company, whose menu, according to *Sunset* magazine (June, 1991), "reads like culinary Esperanto." (noted by Maya Kennedy)

The Spectator (July 18, 1991), reviewing Larry Shue's play *The Foreigner*, about a young Englishman in Georgia who pretends not to speak English, has him using "an improvised Esperanto that consists largely of sounds like *blit, glok* and *bingy-bingy*." *Ĉu la blito glokis la bingibingon?*

The editor of The Hartford, CT, *Courant* was apparently impressed by Linda Hirsh's article of June 10 (see above), because an editorial titled "Esperanto: A little can go a long way" in the same newspaper (July 23, 1991) is very positive about the language, its structure, and its usefulness for the traveling public. The article mentions this summer's one-week Esperanto course at the University of Hartford. (sent by Humphrey Tonkin)

"Esperanto buffs speak well of international language," says Billy Warden, writing about the 39th ELNA Congress in the Raleigh, NC, *News & Observer* (July 25, 1991). For his article Warden interviewed Congress participants Eugene Thompson, Gary Grady, John Massey and Rochelle Grossman. A sidebar includes Esperanto equivalents of such important English-language expressions as "Don't have a cow, man" and "Read my lips!" (provided by Angela Harlow)

A new English textbook for Grade 10 published this year for the well-known McDougal Littell series includes a full-page "sidebar" article on Esperanto. It gives a brief history and description of the language as well as a sample text, and is illustrated by a photo from David Richardson's *Esperanto: Learning and Using the International Language*. (reported by David Richardson)



REGIONAJ KAJ FAKAJ RAPORTOJ

Esperanto-Agado en Usono

CALIFORNIA

Ĉe California Lutheran University en Thousand Oaks, la 29an de majo, 1991, oni okazigis por la fakultato pri komputila lingvotradukado tuttagan konferencon, kun prezento de Esperanto. D-ro James Fonseca, ELNA-ano kaj Profesoro de la hispana ĉe California Lutheran, prezentis la fundamenton de Esperanto en du unuhoraj sesioj. D-ro Myron Bondelid, Profesoro pri Matematiko kaj ELNA-ano, prezentis integriĝon de lingvistiko kaj Esperanto en komputila programo por maŝintradukado. La konferencon aŭspiciis la estro de la Fakultato pri Biosciencoj ĉe California Lutheran, Prof. Michael Kolitsky, kiu ankaŭ prezidis la konferencon. 26 homoj partoprenis. Inter la distraĵoj estis Esperantlingvaj kantoj, ankaŭ tiuj de Alberta Casey. (raportis

Prof. Myron Bondelid)

ILLINOIS

Howard I. Aronson de la Universitato de Chicago prezentis referaton "The Role of Esperanto in the Study of English and Foreign Languages in Elementary School" ĉe la Loka Lerneja Konsilio, Lernejo Louisa May Alcott, en Chicago, la 18an de junio, 1991. Du instruistinoj de tiu lernejo estis komisiitaj partopreni en la Somera Kursaro ĉe San Francisco State University en 1991. (raportis R. Kent Jones)

MASSACHUSETTS

Raportas s-ino Grace Cali, ke ŝi enmetis informon pri la Bahaa Esperanto-Ligo kaj la adreson de June Fritz, BEL-redaktoro, en la bahaan novaĵleteron por

la ŝtato Massachusetts. Ŝi skribis pri la multaj alilandaj BEL-membroj, kiuj deziras korespondi kun BELanoj de Usono. (el *BELmonda Letero* Julio-Septembro 1991)

PUERTO RICO

Dum vizito al Portoriko en aprilo ĉijare, s-ino Grace Cali povis prelegi en Centro Bahaa de San Juan pri "La Bezono por Idiomo Internacia". Dio funkcias laŭ manieroj misteraj, ĉar, kvankam neniu ĵurnalisto ĉeestis la prelegon, en la posta vespero s-ino Cali renkontis (pere de amikino ĵurnalista) televidiston, kiu esprimis intereson produkti ion pri Esperanto! La afero de lingvo (la hispana aŭ la angla) estas politike eksplodema en la kariba insulo Portoriko. (el *BELmonda Letero* Julio-Septembro 1991)

GRATULON AL LA JUS ELEKTITAJ ESTRARANOJ

Kasisto: John Massey

Estraranoj:

William R. Harmon

William H. Schulze

Mark C. Stephens

IMPORTANT NOTICE

Beginning in 1992, libraries and other public institutions can receive *Esperanto U.S.A.* through subscription.

Only \$15/year

Will *your* library have
Esperanto U.S.A.?



EL LA CENTRA OFICEJO

Senpaga Informilo

The "senpaga informilo" which I mentioned in a previous article is now available. This free, postcard-style flyer is aimed at clubs and individuals who would like to have something to hand out when they set up a booth or talk about Esperanto to groups, but who don't want to buy several copies of one of ELNA's other flyers. The postcard has a few facts about Esperanto on it, as well as a detachable part that the interested person can send to ELNA for more information.

When the Board of Directors approved the printing of the flyer at last year's convention they put three conditions on its use. First, the postcard is free but the club or individual who requests it will have to pay for shipping and handling. Second, when requesting the postcards you must send the Central Office a brief description of the event for which the cards will be used, so that we can be sure that the event conforms to the principles of ELNA as stated in its Bylaws. If you won't be using them at some event in the near future but would just like to have some on hand, that's OK. Just tell us that when requesting them. (Of course you can also donate the cards to your local library. Copies of lesson one of the free postal course and other flyers have been placed in libraries for years, with good results.) Finally, a club or individual can receive the postcards free only once in a year's time. The second time we'll have to charge you for them. When requesting the postcards please keep these things in mind, and also tell us how many copies you need.

Information Exchange Program

Copies of the postcard have been sent to all the Esperanto clubs which participate in the Information Exchange Program (IEP). If you haven't seen a copy, your local Esperanto club probably doesn't participate. The IEP was estab-

lished a couple of years ago in order to better coordinate work among the Central Office and local Esperanto clubs. At the beginning of each month the Central Office sends each participating club names and addresses of people from that area who have asked for information about Esperanto. For example, the New York club receives the names of information requestors who live in New York City and the surrounding area. The local club can then invite the requestors to a club meeting or send them information about their organization.

The IEP is good for local clubs because it gives them the names of potential new members, but it's also good for the information requestors. They're more likely to stick with Esperanto if they have the help and support of local Esperantists.

The IEP has been very effective, but I'd like to see more clubs participate. If your club is interested, send a postcard to the Central Office and I'll send you a letter with more details.

Orders, Subscriptions, Etc.

It's been about two years since the following information appeared in *Esperanto U.S.A.*, so it's probably time to mention it again. Here are some things to remember when writing or calling the Central Office:

- The area code for the East Bay, where the Central Office is located, will change on **September 2nd**. The new number for calling the C.O. is (510) 653-0998.

- Have a question about your book or subscription order? We can respond more quickly if you give us the invoice number, which is on the top right-hand part of the invoice, and your customer ID, which is located under the ship-to address. If you don't have this information, tell us when you mailed your order and the amount of the check.

- If an item is listed as backordered on your invoice, any money left over from

your order will be credited to your account to pay for the backordered item. Most of our books come from abroad by sea, and are subject to delays of several months.

- If you subscribed to an Esperanto magazine but haven't received a copy yet, please remember that it can take up to three months for you to receive your first issue. If you haven't received your magazine by then, contact us. Sometimes the problem lies with the publisher who is behind schedule in publishing the magazine. Unfortunately this happens with at least one or two magazines every year. Since we often receive copies of magazines in the Central Office when they're published, we can tell you if the magazine is simply late or if there is another reason for the delay.

If you would like to receive your issues a little quicker, you can choose air mail for two magazines, *Monato* and *Heroldo*. Air- and surface-mail prices for these magazines are listed on the subscription form.

Since most Esperanto magazine subscriptions run on a calendar-year basis, subscription orders received after June 15th are usually processed for the following year, unless the requested subscription is available throughout the year.

Next year we hope to offer the same magazines as this year, with the exception of *Budapeŝta Informilo* (now *Hungara Informilo*). We also plan to carry a new magazine, *Rok' Gazet'*, which has articles, interviews, etc., on the Esperanto rock music scene.

- Moving? Make sure to inform us of your change of address so that you can continue to receive *Esperanto U.S.A.* and other membership materials. We can also inform magazine publishers of your new address upon your request.

Mike Donohoo
Direktoro, ELNA C.O.

ANONCOJ

[La rubriko Anoncoj enhavas diversajn reklametojn, petojn, ktp., kiuj estas diskonigindaj sed ne povas trovi lokon en alia rubriko. Nek ELNA nek la redaktoro povas promesi aŭ prirespondeci definitivitan plenumon de io ajn promesita en anonco.]

Gesinjoroj! Gesamideanoj! Helpu. Laŭ ebleco, **per nutraĵo al Esperanto-familio en St. Peterburgo** [Leningrado]. De 1.12.1990, limigita monata normo por homo estas kuirita kolbaso—1 kg., grio 1 kg., faruno 0,5 kg., ovoj 10 p., ostoj kun viando 1,5 kg., butero 0,5 kg., sunflorooleo 0,25 kg. Helpu kontraŭstari novan blokadon organizitan de moderna komunista registaro. **USSR-Leningrad, poŝt fako 190.000, Aristarhov K. Ju.**

“Barra do Garças...36 paradizaj akvo-faloj je via dispono por kompleta feliĉo, amindumado, amorado kaj ekstazo...” skribas Amarfilio Carvalho, reklamante pri la **13a Kongreso de la Brazila Esperantista Junulara Organizo**, kiu okazos en la nomita urbo apud la rivero Aragvaja de la 19a ĝis 26a de januaro 1992. Temo de la kongreso estas “Sporta, Kultura, Ekologia Edukado”. Por pliaj informoj skribu al **Tuka (prezidantino de BEJO), Caixa Postal 55030, BR-04799-SAO PAULO-SP, Brazilo, tel. (55 11) 247.2448.**

La Litova Esperanto-Asocio esperas profiti el la ŝanĝiĝo al merkata ekonomio, **perante okcidentajn partnerojn por ekonomia kunlaborado en Litovio**. Se vi aŭ via kompanio interesiĝus trovi vin avangarda en tiu nova kampo de entreprenado, bonvolu kontaktiĝi kun **LEA: SU-233000 KAUNAS-C, ab.k. 167, Litovio, tel. (7 0127) 208503.** (Rimarku bone: la litovoj opinias, ke ilia lando estas sendependa; sed por certigi, ke letero ne perdiĝos ie survoje, eble estus pli bone aldoni USSR al la fino de la adreso.)

Kreonte novan Centran Oficejon en la iama hejmo de A. Zilbernik, bopatro de L. Zamenhof, **la Litova Esperanto-Asocio serĉas financon kaj alian helpon** por provizi al sia oficejo necesajn modernajn ekipaĵojn. Donacemuloj povas sendi sian helpon pere de UEA (konto litv-), kun eventuala indiko pri la difinita celo

de la donaco. Por adreso de LEA, vidu la superan anoncon.

La Litova Esperanto-Asocio invitas vin partopreni la **2an Eŭropan Esperanto-Forumon**. La aranĝo simbolas revenon de Litovio en Eŭropon. Forumon partoprenos parlamentanoj kaj reprezentantoj de la litovia registaro. Ĝi okazos inter la 28a de septembro kaj la 5a de oktobro 1991 en la urbo Kaunas, Litovio. Inter temoj traktotaj: lingvopolitiko de Esperanto-movado en uniĝinta Eŭropo; sociopolitikaj ŝanĝoj en Eŭropo kaj la unuaj spertoj de Esperanto-movado; kaj aliaj. Por specifajtoj pri kostoj, vizoj, loĝado ktp, petu informon ĉe la Litova Esperanto-Asocio, kies adreson vi trovos en supera anonco.

Por la jaro 1990 aperis/as sep numeroj de la **larĝformata, kolorilustrata kvarpaĝa revuo Sovetia Esperantisto** kaj, komence de majo, ankoraŭ kvar numeroj estis en tipografio. Kosto por la tuta kolekto estas \$12. Oni povas mendi la kompletan, pagante la sumon al UEA, konto kun kodo saik-x. Al la redakcio bonvolu sendi kopion de la kvitanco pri pago kaj vian ĝustan adreson. Adreso de la redakcio: **Šaig Bähramoglu MÄMMÄDOV, Ĥuluflo 29/52, SU-370033 BAKY-33, Azerbajĝanio, USSR.**

Okazos la **35a Internacia Seminario de Germana Esperanto-Junularo** en la urbo Cuxhaven (Nordgermanio) inter la 27a de decembro 1991 kaj la 3a de januaro 1992. La temo estos: “Ameriko: ĉu 500 jaroj da civilizacio aŭ koloniismo?” La Internacia Seminario celas gejunulojn inter 14 kaj 26 jaroj, kiuj bone regas Esperanton kaj povas aktive partopreni la seminarian programon. Oni kune diskutos, lernos, ludos, dancos, manĝos kaj dormos en internacia etoso. Se vi volas partopreni en la tema programo, bv kontakti Matthias Funke, p/a GEJ, Rheinweg 15, W-5300 BONN 1, Germanio, tel. (49 228) 23 58 98. Se vi volas partopreni en la distra programo, bonvolu kontakti Simone Fischer, Steinmauerner Str. 22, W-7550 RASTATT 1, Germanio, tel. (49 7222) 21 515. Por informoj pri aliĝoj, kotizoj ktp: **Germana Esperanto-Junularo, p/a**

Marc Stessgen, Hagedornstr. 6a, W-5000 KÖLN 80, Germanio.


Laŭ lastatempa decido, okaze de la 500a datreveno de la vojaĝo de Kristoforo Kolombo al Ĉinio (li mistrafis) kaj de la 350a datreveno de la fondo de Montrealo, la **48a Internacia Junulara Kongreso de la Tutmonda Esperantista Junulara Organizo** okazos en Montréal, Québec, Kanado, inter la 2a kaj 9a de aŭgusto 1992. La kongresejo estos la Cégep Maisonneuve, kelkmil-studenta kolegio. La kotizaro meze estos nur 250 \$kanadaj. Por informoj: **Kebekia Esperantista Junulara Organizo, 6358-A rue de Bordeaux, MONTRÉAL, Québec H2G 2R8, Kanado, tel. (514) 272-0151.**

La nova kaj tre aktiva Malajzia Esperanto-Asocio estus feliĉa ricevi **Esperanto-librojn kiel donacon** al la movado en Malajzio. Adreso por sendado estas: **Fino Chan Sook Wai, 1008 Jalan Selesa 4, 58200 KUALA LUMPUR, Malajzio.**

La verko **Kiu posedas Danion?** de Lennart Weber estas nun havebla en Esperanta traduko. La verko traktas la distribuecon de kapitalo kaj posedaĵoj en Danlando, kaj montras, kiel la ekonomia potenco de la lando estas koncentrita en malmultaj manoj. La traduko estas de Betty Larsen; ĝi estas havebla ĉe la eldoninto: **Dana Laborista Esperanto-Asocio, Edvard Griegs Gade 28, DK-2100 KOPENHAGO, Danlando, kontraŭ 20 danaj kronoj.**

Ĝus ekestis nova turisma agentejo en Varsovio: **VETURI (Varsovia Esperanta Turistoficejo)**. Oni proponas unu- aŭ du-tagajn restadojn en Varsovio, aranĝas interŝanĝon de Esperanto-instruistoj, serĉas instruistojn por intensaj nacilingvaj kursoj aranĝotaj surbaze de Esperanto, kaj estas pretaj kunlabori kun aliaj Esperantaj turismaj oficejoj. Por informoj: **Varsovia Esperanta Turistoficejo, PL-01 914 WARSZAWA, Dantego 1-B / 48, Pollando, tel. (48 22) 38 21 02.**

La Esperanto-Klubo “Pli da Lumo” en Kubo malhavas devizojn por ebligi la aĉeton de Esperantaj materialoj kaj eldonaĵoj el eksterlando, kaj **serĉas bonvolajn esperantistojn**, kiuj helpos ilin pri tio. Se vi volas kontribui (ekz. jam legitajn revuojn ktp), bonvolu kontakti: **Esperanto Klubo “Pli da Lumo”, Gaveta Postal #2, SANTIAGO DE LAS VEGAS 17200, Ciudad Havana, Kubo.**



LETEROJ

[Note: The letter column is a free-speech forum for members of ELNA. Views expressed are not necessarily those either of the editor or of the Esperanto League for North America, Inc.]

[Prof. Humphrey Tonkin, currently President of the University of Hartford (Connecticut), President of the Universala Esperanto-Asocio for nine years (1974-1980, 1986-1989), replies in this letter to that of Prof. Jonathan Pool, which appeared in our last number.]

Recently Jonathan Pool has sent me a copy of his letter to the ELNA Board on the question of how and when to use the resources of ELNA for the promotion of Esperanto in this country.

Jonathan is highly critical of the publications of ELNA, and I wish to come to their defense. While it may be true, as Jonathan suggests, that the organization and its members are insufficiently aggressive in the promotion of Esperanto and spend too much of their time in marginal pursuits, I do feel that ELNA's publications are better than they have ever been in the past and that they are evidently having some effect in convincing more people than ever before to join the organization. This is no small achievement. Indeed, it is arguable that without these publications the membership of the organization would drop off again and we would all be worse off than we were before.

Thus, while I certainly admire Jonathan's ability to get us to focus on the right issues, I believe that in this case his criticisms miss the mark. I, for one, hope that the publications of ELNA will continue and that Jonathan's criticisms will lead only to their improvement, not to their elimination.

Humphrey Tonkin

1. Here we, in ELNA, go again, spreading Heresy: Henrietta L. Kroll, *Esperanto U.S.A.* 1991[3] writes that we should "teach" Esperanto in schools.

2. Of course NOT.

3. Do you want Esperanto to be "hated" or "berated" or "castigated" or "downgraded" to "a school subject"?

4. Certainly NOT.

5. Esperanto should be taught in the home, and in Esperanto clubs through the TRILINGUAL FORMAT.

6. NEVER, NEVER, NEVER teach Esperanto in school, college, or university.

7. What should we do for our schools, colleges, and universities?

8. A. We should print SOME, but NOT necessarily ALL, books in the TRILINGUAL FORMAT. To the printed material add audio tapes, video tapes, and inter-active computer programs.

9. We should have, in ELNA or elsewhere, an official translation service —> English (or any other language) to Esperanto, so that we will retain the purity and standardization of Esperanto as a universal auxiliary language.

10. Request —> ELNA show some LEADERSHIP = Print this letter in the TRILINGUAL in your newsletter.

Dr. Richard Mullins

[Unfortunately, far from being able to print letters or anything else in trilingual format, space and budgetary considerations generally prevent us from printing material even bilingually; our articles, etc., are usually in either English or Esperanto, at the whim of the writer or editor. In fact, sometime down the road, if our Spanish-speaking membership continues to grow it may be necessary for us to go to a strictly monolingual format—everything in Esperanto. But that's a matter for the future. As to your opinions on Esperanto in school, you'll find some support for them in the article by Ernő Csizsár that appeared in the Feb. 1990 issue of Esperanto.]

[Prof. Ronald J. Glossop, de la Universitato de Suda Ilinojso en Edwardsville, jam dum pluraj jaroj okupas sin pri la instruado de Esperanto al talentaj geknaboj. Por la komenco de la sube traktota afero, vidu n-ron 1991(2) de EUSA.]

Mi tre dankas vin pro la publikigo de mia alvoko por helpo en la dua numero por 1991 de Esperanto U.S.A. pri mia projekto rilate al la Naŭa Monda Konferenco por Naturdonitaj kaj Talentaj Infanoj, kiu okazos en Hago je la

fino de julio 1991. Mi ankaŭ tre dankas al Lusi Harmon pro ŝia helpo kiel kolektanto de kontribuoj por tiu projekto. Kaj mi ankaŭ tre dankas al la kvardek kvin personoj kiuj sendis kontribuojn. Kun tiom da helpo la projekto bone progresas.

Kiam mi skribis la alvokon, mi opiniis, ke la kosto por la vojaĝado de la infanoj de la Talento Fondaĵo el Budaörs, Hungario, al Hago kaj reen estos \$500. Post mi eksciis, ke la kosto estos \$1500. Sed ne maltrankviliĝu. Vi malavaraj esperantistoj jam sendis pli ol \$1700! Mi multege dankas al vi.

Kiam mi estis en Budapeŝto je la 23a de aprilo (kiel parto de delegitaro por instruistoj de la talentaj infanoj), mi vizitis la klason de la ok-jarulaj esperantistoj subtenitan de la Talento Fondaĵo. Mi ankaŭ interparolis kun András Lukács, la Sekretario de tiu Fondaĵo. Mi informis lin, ke la mono estas havebla por ilia vojaĝo al Hago. Por certigi al s-ro Lukács, ke la hungaroj estos gastigitaj en Hago, mi telefonis al sino van Geffen en Nederlando, kaj ŝi diris, ke ŝi aranĝos la tranoktadon kaj manĝojn por la hungaroj dum ili estas en Nederlando.

Do nun ŝajnas, ke ĉio estas en ordo. Je la unua de aŭgusto la 12 infanoj el Hungario estos en Hago por partopreni en mia prezentaĵo pri la instruado de Esperanto al infanoj. Mi ankaŭ invitis infanajn esperantistojn el Nederlando kaj Belgio por partopreni en mia prezentaĵo. Mi esperas, ke multaj ĉeestantoj ĉe la konferenco vidos, ke infanoj el diversaj landoj povas interparoli Esperante.

